

Zhāng Jiǔ Líng,
Hú kǒu wàng lú shān pù bù
shuǐ

Wàn zhàng hóng quán luò
tiáo tiáo bàn zǐ fēn
bēn liú xià zá shù
sǎ luò chū chóng yún
rì zhào hóng ní sī
tiān qīng fēng yǔ wén
líng shān duō xiù sè
kōng shuǐ gòng yīn yūn

Verkinto de tiu ĉi ĉina poemo estas Zhāng Jiǔ Líng.

Arg-987-1990 (2014-04-04 19:34:22)

Pri la poeto vidu la retejon <http://ja.wikipedia.org/wiki/eĉxĉeĴŭ,,ŋ> respektive http://en.wikipedia.org/wiki/Zhang_Jiuling. La titolo signifas: “De Hukou mi rigardas la akvofalon de la monto Lushan”.

Zhāng Jiǔ Líng,
La akvofalo

tradukita de Manfred Retzlaff

Blinde sin ĵetas purpur' akvofala
en la abismon tie ĉi.
Kaj disiĝas la ruĝo kaj pala
akvofumo eliĝas el ĝi.
De l' altej' nebulvualo
subeniĝas tie ĉi,
ĝi ruliĝas tra la valo,
de la arboj gutas ĝi.
Glime sur la ŝaŭm' ŝvebanta
estas arko el odor'
kaj la akvo estas bruanta
kvazaŭ tondro en la for'.
El la verdo de l' arbaro
rokoj supren levas sin.
La prafort' de l' vivantaro
bolas jen en la ravin'.

*Traduko de la ĉina poemo “Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuǐ” de Zhāng Jiǔ Líng en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2013-12.*

Arg-987-1993 (2014-04-07 16:42:27)

Zhāng Jiǔ Líng,
La akvofalo

tradukita de Xiong Linping

De alto de dek-mil futoj,
kvazaŭ de la ĉielo
la kaskado fluge ĵetas sin suben,
kaj ĉirkaŭ ĝi prezentiĝas
nimbo jen ruĝa jen purpura.
Ĝi, ŝajnante esti ĉielarko sub la suno,
rekte falas inter arboj kaj tra la nebulo;
en la serena vetero aŭdeblas
bruo de vento kaj pluvo.
Kiel majestas la monto Lushan!
La nebulo kaj la akvo harmonie
kunfandiĝas en fean iluminacion.

Traduko de la ĉina poemo “Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuǐ” de Zhāng Jiǔ Líng en Esperanton de Xiong Linping.

Arg-987-1991 (2014-04-03 10:44:09)